




ILEI POR LA TAGO DE LA ESPERANTA LIBRO (15-12-2021): HODLER EN MOSTAR DE SPOMENKA ŠTIMEC

Por celebri la Zamenhofan Feston, kiu estas ankaŭ tradicie la Tago de la Esperanta libro, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) proponas simbolan tutmondan legadon de la komenco de la libro *Hodler en Mostar* (2006) de Spomenka Štimec

Spomenka Štimec estas esperant-lingva verkistino el Kroatio. Ŝi estis sekretario de la Esperantlingva Verkista Asocio, kiun fondis Tibor Sekeli en Budapeŝto en 1982, kaj ŝi estas nuntempe membro de la Akademio Literatura de Esperanto. La internacia literatura organizaĵo Esperanta PEN konsideras ŝin inter la kvin plej elstaraj verkistoj indaj esti kandidatoj por la Nobel-Premio pri Literaturo. Ŝi estas aparte grava por ILEI, ĉar ŝi kontribuis kun Zlatko Tišljariĉ, Tibor Sekeli kaj aliaj al la kreado de la Zagreba Metodo por la instruado de Esperanto. Ŝi ankaŭ instruis Esperantan literaturon en progresintaj kursoj dum kvin jaroj ĉe la Nordamerika Somera Kursaro (NASK) en Usono.

La esperantaj verkoj de Spomenka Štimec estas konataj eĉ ekster esperantujo. La aŭstra verkisto Clemens Johann Setz en sia fantazia germanlingva prozo *Die Bienen und das Unsichtbare* (*La abeloj kaj la nevideblo*, 2020) en la tuta libro prezentas Esperantan literaturon kaj al ŝi dediĉas unu ĉapitron. Mondial preparas la esperantan eldonon de tiu libro.

Hodler en Mostar aperis en la kroata (2020) kaj korea (2021) tradukoj kaj estas nun tradukata ankaŭ al la japana. Tio estas romano verkita origine en Esperanto pri la vivo de la svisa pentristo Ferdinand Hodler kaj du el liaj pentraĵoj, kiuj malaperis. Li estis la patro de Hector Hodler, fama esperanta pioniro kaj la fondinto de Universala Esperanto-Asocio. Nia elekto estas ankaŭ iel omaĝo al Mirejo, antaŭa prezidantino de ILEI, kies familio devenas de rivala svisa pentristo, Louis Léopold Robert.



Ni sincere esperas, ke nia komuna legado de la komenco de tiu ĉi inspiriga libro pri nia historia fono povos ne nur pasigi al ni ĉiuj plaĉan Tagon de la Esperanta libro, sed ankaŭ pli multe konigi la interesan verkon de la aŭtorino.

Spomenka Štimec

Hodler en Mostar



Edistudio



fotis Ivan Posavec / Gloria

Spomenka Štimec, unu el la plej sentemaj verkistoj de la nuntempa Esperanto-literaturo, vivas en Kroatujo, kie ŝi naskiĝis en 1949. Esperanton ŝi malkovris en la lernejoj kaj profesie eklaboris pri ĝi post diplomiĝo pri lingvoj en la universitato de Zagrebo.

Profesia engaĝiĝo pri Esperanto montris al ŝi diversajn aspektojn de la Esperanta komunumo kaj ŝi fariĝis ties verkisto: post ŝia unua verko *Ombro sur interna pejzaĝo*, en kiu ŝi fokusigas la amon kaj disiĝon per Esperanto, sekvis la vojaĝlibroj *Nesenditaj leteroj el Japanio* (tri eldonoj: Esperantlingva, ĉina,

japana), *Geografio de mia memoro* en kiu ŝi interpretas la mondon per la okuloj kaj koro de esperantisto, novelaro *Vojaĝo al disiĝo*, en kiu ŝi kolektas diversajn fragmentojn de sia specifstila prozo. Du el ŝiaj verkoj estis surscenigitaj: *Gastamo* dum la UK en Antverpeno kaj *Virino kiu flustris en uragano* dum la UK en Pekino.

Elmetita al la forta defio de neripetebla sperto, post mondvojaĝoj ŝi pasigis la militajn jarojn en sia hejmurbo, notante pri la sorto de esperantistoj: *Kroata milta notlibro*, originale verkita en Esperanto, havis siajn germanan, japanan kaj francan eldonojn.

En 1966 aperis *Tena - Hejmo en Mezeŭropo* kaj en 2002 *Tilla*, omaĝe al la mezeŭropaj radikoj de ŝia literatura sentemo. Ŝiaj verkoj estas reprezentitaj en la antologio de la Esperanta novelaro *La trezoro*, en la krestomatio *Ek al leg*, en la instrulibro de Boris Kolker *Vojaĝo en Esperanto-lando* kaj en la novelaro *Mondoj*.

Ŝi kontribuis al la Esperanta komunumo en diversaj partoj de la mondo per prelegoj kaj instruado kaj mem kunaŭtoris kelkajn lernilojn. Interalie ŝi instruis en la universitatoj en Seulo, Hartford kaj San Francisko.

ISBN 978-88-7036



Originale verkita en Esperanto.

Kovrile: memportreto de Ferdinand Hodler.

La titolpaĝa pentraĵo estas nesignita memportreto de Ferdinand Hodler el la jaro 1912 (dimensioj 37 x 28 cm). La pentraĵo prezentita sur la paĝo 10 estas verko de Ferdinand Hodler "Lunlumo sur la lago de Genevo", oleo sur tolaĵo, pentrita ĉirkaŭ la jaro 1881 (dimensioj 17,3 x 23,5, signita per fremda mano FH). Ambaŭ verkoj apartenas al Arta Galerio de Bosnio kaj Hercegovino sed ili estas ŝtelitaj el la Galerio dum la milito.

La eldonisto kaj la verkisto elkore dankas al la Galerio pro la permeso publikigi la pentraĵojn kaj diskonigi ilian malaperon, esperante ke la verkoj revenos al la posedanto:

Umjetnička galerija BiH
Zelenih beretki 8
BA 71000 Sarajevo
Bosnio kaj Hercegovino

Dankon al Sen Rodin kaj Elda Doerfler por la revizio.

ISBN 978-88-7036-073-8

© 2006, Spomenka Štimec, Zagrebo, Kroatujo

© 2006, Edistudio, c.p. 213, I-56100 Pisa, Italujo

1. La unua pozado

Li estis pentristo. Ŝi estis modelino. Li estis granda svisa pentristo. Ŝi estis Jeanne¹, unu el liaj modelinoj. Unu el tre ŝatataj.

Kiam ŝi eniris lian atelieron, ŝi ne sciis ke ŝi pozos dum dek kvin jaroj. Ŝi eniris timeme la unuan fojon. Ne komforte ŝi fartis. La ejo apartenis al fama svisa pentristo. Kiam ŝi ĉesis pozi, ŝi ĉesis pozi al unu el la plej famaj eŭropaj pentristoj. La nomo Hodler egalestiminde staris apud la nomoj van Gogh, Gaughin, Munch.

Ŝi estis dudek ses kiam ŝi la unuan fojon malbutonumis sian robon por pozi kiel nudulino.

Estis la jaro 1901. La jarcento estis ankoraŭ virge juna, kiel la neĝo sur la fenestra breto. Nenio ankoraŭ okazis: La Nobelpremio ankoraŭ ne estis atribuita. En Bostono sinjoro Gilette ankoraŭ ne patentigis sian aparaton por razado. Oficejo por intelekta posedaĵo en Bern ankoraŭ ne enpostenigis teknikan eksperton de la tria klaso Albert Einstein. Germana kirurgo August Bier ankoraŭ ne publikigis pruvojn pri apliko de kokaino por anestezo de spino. Nafto en Teksaso ankoraŭ ne estis malkovrita. Pri koncesio por konstruado de fervojo al direkto de Bagdado ankoraŭ ne estis decidite.

Hodler petis ŝin veni je la 10-a. Li volis uzi la tagan lumon.

Li prenis ŝian mantelon. La ejo estis tre eta. Ŝi ridetis vidinte la divanon tiom mallarĝan. La prezo de la pozado jam estis fiksita: li renkontis ŝin en la ateliero ĉe amiko, kiu same pentris.

Ankaŭ tiu ateliero odoris je kemiaĵoj. Ŝi ternis kiam ŝi etendiĝis

1. *Jeanne Charles* (prononc. *Jan Ŝarl*)

sur la divanon.

Unu, du, tri fojojn.

Li atendis ke ŝi ĉesu ternadi.

– Eble mi devus kovri vin. – li ridis.

La kovrilo kiun li etendis estis tre maldika. En unu ĝian angulon iu viŝis blukoloran penikon.

– Bonvolu iom etendi la brakon. – Ŝi etendis kaj rigardis al tiu direkto. Tie sur la breto staris libro. Ŝi povis legi la titolon *Signifo de sonĝoj* de Sigmund Freud. Ankoraŭ virge nova. Eble ĵus ricevita, ankoraŭ ne malfermita.

Li rigardis ŝin kaj rapide revenigis la rigardon al sia papero.

Ŝi silentis. Por ŝia gusto la silento estis iom tro longa.

– Ankoraŭ iomete restu tiel. – li petis.

Plurfoje ŝi pozis al diversaj pentristoj, ŝi sciis ke necesas pacienci.

Li desegnis tre rapide.

– Ĉu vi laciĝis?

Ŝi estis laca ne de la pozado sed de lia rigardo. La rigardo fiksas kaj penetris profunden.

Tio ne estis ŝia unua pozado, tio estis ŝia plej bela pozado. Kaj la plej longdaŭra. Tiam ŝi restis dum la tuta nokto. Neĝis ekstere. Li havis malfreŝan panon kaj fromaĝon jam iom rancan. La ruĝa vino en botelo apenaŭ atingis duonon. Nur unu glason kun flavkoloraj spuroj li havis.

Ŝi rakontis al li tiunokte, sur eta divano:

– Mi naskiĝis en Liono.

Ŝiaj lipoj estis tre proksimaj al lia orelo.

– Mi ne diros kiam. Vi maldungos min pro mia aĝo. – ŝi ridis.

– Mia panjo estis floristino. Mia panjo ligis tulipajn tigojn per rubando por ke la akvo grimpu rekte en iliajn kapojn kaj ke ili ne kliniĝu. Tiel ankaŭ mi kreskis: mi devis teniĝi rekte kiel ŝiaj tulipoj.

La patron mi ne konis. Kiel 16-jara knabino mi fuĝis de la hejmo. La patrino neniam serĉis min. Mi neniam revenis al Liono.

Li ŝatis la moviĝojn de ŝiaj lipoj ĉe ŝia orelo. Ŝi ĝuis kuŝi apud li. Kiam lia kapo estis proksima al ŝia vizaĝo, lia rigardo ne plu ĝenis.

Li neniam demandis pri la foriro de la 16-jara knabino el la hejmo por ke ŝi ne forigu la lipojn de lia orelo. Sed ŝi tamen forigis ilin.

– Rakontu vi! – ŝi tiris la fingrojn tra lia barbo.

– Mi naskiĝis en Bern. En la jaro 1853. En marto, la 14-an. Mi estis la plej aĝa el naŭ infanoj. Bern donis al mi ideojn pri tio kio estas belo: domoj, turoj, putoj. La unuajn lecionojn mi havis en lernejo en La Chaux-de-Fonds.

Kiam mi estis 12-jara jam mortis kvin el miaj gefratoj kaj mia patro. Pro ftizo. Tiam mia panjo edziniĝis al la pentristo Schuepbach kaj mi eklaboris ĉe la duonpatro. Mia panjo mortis unu jaron poste. Mi forlasis la metiejon de mia duonpatro kaj foris al Genevo.

– Vi sola, kiel knabeto? Post tiom da mortoj?

– Mi, 13-jara. Akceptis min franca komponisto Henri Giroud. Poste kiel studenton akceptis min en sian klason profesoro Menn. Tio estis tre grava afero por mi. Li estis por mi Ingres, kies lernanto li estis. Li signifis por mi la saĝon mem. Ĝuste li instruis min rigardi kaj vidi.

– Kaj vi famiĝis per via unua verko pri nudulino!

– Tute ne. Mia unua serioza pentraĵo nomiĝis *Studanto*. Mi pentris ĝin du jarojn antaŭ ol mi finis la studadon, en la kelo de la familio, kiu donis al mi loĝejon.

– Ĉu ne mankas muzo en tiu rakonto?

– Muzoj loĝis en Hispanio. Mi forveturis tien, al Prado. Dum du jaroj mi vojaĝis tra Hispanio por studi Rubens kaj Velasquez. Rubens min fascinis.

– Kaj Dulcinea?

– Ŝi nomiĝis Augustine.

– Kaj vi trovis ŝin en Madrido?

– Tute, ne. Mi trovis ŝin hejme, en Svislando. Unue mi, laŭ la mendo, pentris *Preĝon en kantono Bern*. Poste mi trovis mian unuan atelieron en Genevo, etan mansardon. Por ĉiam mi memoras la nomon de mia unua ateliero: Rue du Cendrier 15. Mi renkontis Augustine. Ŝi estis modistino, ŝi kudris. Ni enamiĝis. Mi gajnis la trian premion ĉe konkurso, en 1884 en ŝia ĉemizo.

– Kaj ŝi naskis al vi 9 infanojn.

– Tute ne. Nur unu filon.

– Kiel li nomiĝas?

– Hector.

– Hector. Hector Holder. Du H. Interese!

– Kiom li aĝas nun?

– Li naskiĝis en 1887. Nun li estas lerneĵano.

– Kie li estas nun?

– En lernejo. Ni vidas nin ofte.

– Kaj ŝi?

– Ni disiĝis kiam Hector estis bebo. Mi estas malfacila karaktero. Ŝi estis baldaŭ laca de miaj literaturaj vesperoj en la ateliero.

– Ĉu vi desegnis ŝin?

– Jes, certe, ŝi multe pozis al mi. Ankaŭ Hector ofte pozas al mi.

Hector kaj mi estas en tre bonaj rilatoj.

– Kaj Augustine?

– Ŝi vivas tre modeste. Ni daŭre amikas per Hector.

– Mia amikino Mimi diris, antaŭ ol mi iris al vi, ke vi estas jupĉasanto. Kaj ke via plej fama pentraĵo nomiĝas *Nokto*. Mimi diris ke vi estas la edzo de Berthe.

– Nu, Mimi estas bone informita. Mi estas eksedzo de Bertha kaj edzo de Berthe. Kaj la *Nokto* estas mia plej fama verko. Sed ne pri virino temas en ĝi, sed pri la morto.

– Noktiĝas de tiom da Bertoj. Kiam vi edziĝis?

– En 1889, se mi ne eraras. Jes, en 1889 kaj disigi en 1891.

– Augustine estis tre kuraĝa. – penseme diris Jeanne.

Nur en si ŝi aldonis: li lasis ŝin kun unujara bebo. Kaj edziĝis al Bertha.

– Kuraĝa? Certe! Imagu, ŝi pozis por mi *Kuraĝan virinon* starante sur la tegmento de mia ateliero.

Jeanne pensis pri alitipa kuraĝo sed ne komentis lian miskomprenon. Ŝi jam sciis, ke la vortoj ne ĉiam esprimas la samajn ideojn.

– Kaj kial famiĝis *La Nokto*?

– Mi kreis la *Nokton* por la Printempa salono. Kaj en ĝi mi traktis la fantomon de la morto. La morto min hantis. Sed la pentraĵo famiĝis ne pro la morto sed ĉar ĝi estis forigita de la Salono “pro ofendo de la publika deco”, post kiam ĝi jam estis muntita sur la muron de la ekspoziciejo. Kiam ĝi estis elŝetita, mi ekspoziciis ĝin solan en *Palaco Electoral*. La gazetaro faris belan reklamon pri la skandalo pro la verko kiun akceptis Ĵurio kaj rifuzis Konsilantaro. Venis mil tricent personoj vidi la rifuzitan verkon. Poste, samjare mi portis la *Nokton* al Parizo. Bonaj kritikoj tie. Kaj la *Nokto* gajnis la oran medalon en la internacia ekspozicio en Munkeno.

– La ĝenovanoj malmuntis ĝin antaŭ la malfermo de la ekspozicio? Mi sciis ke ĝenovanoj estas prudaj, sed mi miras ke munkenanoj estis tiom akceptemaj. Kiam tio okazis?

– Antaŭ dek jaroj.

– Do, la *Nokto* estas la plej grava dato en via biografio?

– Eble ne, eble la plej grava dato estis la lasta jaro, kiam mi fariĝis membro de Viena kaj Berlina Secesioj. Kiel via ŝultro malvarmiĝis!

– De la Berlina kio?

– Secesio. *L'art Nouveau. Jugendstil*. – li tiris la kovrilon por varmigi ŝin.

Estis la jaro 1901. Nenio ankoraŭ okazis en la nova jarcento.

Neĝis. Estis svise pura vintro. De la divano videblis neĝeroj sur la fenestro. Jeanne algluiĝis al la varma korpo.

Jeanne Charles ennestiĝis en la vivon de Ferdinand Hodler.

Matene doloris lin la muskoloj. Tiu lito estis vere tro mallarga por dormi.

Hodiaŭ vespere lia edzino antaŭvidis gastojn, li memoris.

Li staris antaŭ la papero kiun li prideseĝnis hieraŭ kaj kontemple rigardis ĝin. Ne malbone! Li estis kontenta.

Li ridetis al la modelino Jeanne, kies korpo tuj okupis la lokon sur la divano kiun li liberigis. Jeanne dormis ankoraŭ kun infane ruĝaj vangoj. Iom moviĝis ŝiaj okulharoj. Ŝi songis.

Hodler ĉesis rigardi Jeanne kaj observis sian hieraŭan desegnon. Li decidis nenion aldoni.

Li ne sciis ke komenciĝis la nova ĉapitro en lia vivo. La nova akto. Akto Jeanne.

gazeteton en Esperanto tra la mondo kaj la mono por poŝtmarkoj neniam sufiĉis.

– Ĉu Hector heredis vian talenton? – scivolis Jeanne kiam ili restis solaj.

– Talento videblas. Li desegni kapablas, sed desegnado ne interesas lin. Liaj pasioj kuŝas aliloke, iom disipitaj.

Hodler komencis desegni kvadratojn sur grandformatan paperon.

– Kaj kial vi kvadratigas la paperon unue, mi ne komprenas tion.

– Kvadratoj helpas al mi solvi la spacon.

Li tranĉis figuron el kartono kaj ŝovis ĝin laŭ la kvadratoj por trovi la plej taŭgan lokon por ĝi.

– Ha, tiel simple. Tion eĉ mi povus!

– Provu! Kial ne.

Jeanne kolektis la eltondaĵojn kiujn Ferdinand lasis tra la ateliĝero, prenis grandan blankan paperon kaj spacigis ĝin per kvadratoj kaj komencis ludi per la eltonditaj paperoj.

– Nu, vidu! Sed prefere mi desegnu pejzaĝon, tiel kiel vi faras.

– Bonvenon al la konkurenco!

Braĝon ŝi ŝatis. Ŝi povis longan tempon kaŭri ĉe la kameno kaj rigardi la braĝon. Ŝi ŝatis la formojn de la braĝeroj disfalantaj.

Ŝi kaŭris ĉe la forno kaj silentis. De ŝiaj malsekaj vestaĵoj pendigitaj sur la ŝnuro ĉe la forno leviĝis bonodora vaporo. Kiam Jeanne leviĝis, ŝia vizaĝo havis la ruĝetan koloron de sangorapido kaj la okuloj havis aldonan brilon de la revo. La ovalo de la vizaĝo rondiĝis. Li ŝatis ŝin tia, varma de la forno. Tuj eblis aŭdi ĉion pri kio ŝi revis.

– Mi ŝatus, se ni estus sufiĉe riĉaj, printempe veturi al Florenco.

– Mi trovis gladistinojn por ni. Ŝi gladas ĉe la najbaroj kaj estas simpatia.

– Vi bezonos novan jakon por la malfermo de la ekspozicio. Jam en Vieno sur la malnova ne plu eblis kaŝi spurojn de tineo.

Tion devus vidi lia edzino kaj ne mi, pensis Jeanne.

Li ne invitis ŝin akompani lin al la Viena Secesio en 1904. Al la malfermoj de la ekspozicioj iras edzinoj, ne modelinoj. Tie Jeanne estus tute fiera ke ŝi rilatas al Holder. Larmoj estus sur ŝiaj okulharoj, kiam ŝi vidus ke la alegorioj kaj historiaj komponaĵoj de Hodler pendas en aparta Holder-ĉambro sub grandaj lumoj kaj ke la publiko majeste preteriras tiujn, kiujn ŝi konis dum ili estis nur skizoj. Ŝi ŝatus la rigardojn de preterpasantoj sur sia vizaĝo. Admiro de la publiko transirus al ŝi. Ŝi pozas al tiu artisto. Li amas ŝin. Tre

bela rideto mildigis la vizaĝon de Jeanne.

Ke Paul Cassirer, grava Berlina artfakulo, invitis Hodler al Berlino kun 31 pentraĵoj tion ŝi ankoraŭ ne scias. Ke tien venos Klimt, Liebermann, juna Kokoschka kaj Kandinski pri tio li diris ankoraŭ nenion.

Hejme Jeanne rekaŭris ĉe la forno. Li rigardis la kliniĝon de ŝia dorso. Subite ŝi ekkriis kaj forsaltis.

Tro malfrue. La fluganta fajrero direktiĝis al ŝia brako kaj truis la puloveron.

– Vidu nun! Tute difektita! Dum ni diskutas ke vi ne havas jakon! Kaj ĝuste la plej kara pulovero! Kie mi trovu similan siringo-koloran puloveron! Nun vi aldonu karbon al la fajro! Mi ne plu volas umi pri la forno!

Li ekkauŝis ĉe la fajro kaj elektis belan pecon el la karbujo. Du, tri.

Neniam plu li desegnis ŝian spinkurbiĝon ĉe la fajro.

Du jarojn poste Hodler konfirmis al Jeanne ke lia filo tute forturniĝas de pentrado.

– Li nun estas freneza pri ideo de Internacia Lingvo. Tio sorblas lian tutan energion, samkiel tiun de Edmond.

– Pri kio?

– La Internacia Lingvo Esperanto.

– Neniam mi aŭdis pri io tia. Ŝajnas nenio danĝera. Lernejaĝe oni entuziasmiĝas pri io ajn.

Jeanne ne komprenis ke tio estos dumviva malsano. Ke Hector kaj Edmond ĝisfunde lernis la Internacian Lingvon de D-ro Esperanto al ŝi indiferentis. Pri la ĵurnalo en Esperanto kiun kreas la du knaboj en la lerneja benko, ŝi povis imagi nenion. Kaj ke tiun *Junan Esperantiston* ili administros dum plenaj kvin jaroj kaj verkos artikolojn por ĝi, estis ekster ŝiaj intereso.

Jeanne ŝatis elpensadi. Ŝi ne estis ĝenata ĉar ŝi pri la sama afero donis tute aliajn informojn. Hodler ĝuis la esprimon de ŝiaj okuloj dum ŝi rakontis. La flamo en ŝiaj okuloj ŝanĝiĝis kiel la enhavo de ŝiaj diroj:

– ke ŝia panjo estis malriĉa floristino.

– ke ŝia panjo estis pianinstruistino, kiu devigis Jeanne, kun gladilo en la mano, lerni pianon.

– ke ŝi venis en Svislandon ĉar iu riĉa bankisto pagis al ŝi studadon, ĉar ŝi estis la plej talenta lernantino en Liono.

– ke ŝi ekstudis kun Mileva Marić kiu poste estos edzino de Albert Einstein sed ŝi prefere ne memoru kial ŝi forlasis la studadon.

– ke ŝia patro lasis al ŝi duonon de domo en Liono, kondiĉe ke ŝi revenu vivi tie.

– ke ŝia patro lasis al ŝi nenion krom la verukon sur la dorso.

Pri la veruko – tio estis vero. Hodler konis ĝin. Ĝi troviĝis sur la malkomforta loko, precize tie, kie la korseto kunlaĉiĝis. Ja li ne devis unufoje okupiĝi pri tiu korseto.

Ŝi babilis dum ŝi pozis por la *Vero* – la senkulpan nudulinon Hodler kreis el ŝi dum ĉirkaŭ ŝia neprotektita korpo grupiĝis nigre kovritaj fantomoj. Estis la tempo de *J' accuse*.²

2. *J' accuse* (france) estas la titolo de la malferma letero de la franca verkisto Emil Zola al la tiama franca prezidento pri la Afero Dreyfus. En Parizo estis false, pro laŭdira spionado, akuzitala juda oficiro Dreyfus. La voĉo de Zola multe influis publikan opinion ankaŭ ekster Francio; Dreyfus estis liberigita en 1900.

3. Mostar 1901

Tiun januaran matenon de la jaro 1901 en Mostar kunsidis anoj de *La unua hercegovina velocipeda asocio*. La prezidanto anoncis gravan programon por tiu jaro: okazos ŝosea konkurso je la distanco Konjic-Jablanica-Mostar.

Punkto du: Urba konsilantaro decidis postuli imposton por ĉiu biciklo. Ĉiu posedanto devas pagi ses kronojn po biciklo. Esceptita estis la bicikloj de urbaj oficejoj, armeaj burooj kaj bicikloj de kuracistoj.

Ekfunkciis propra fabriko de bicikloj, prizorgata de du enmigrintoj, reklamanta sin kiel *Deponejo de radoj, propramane faritaj, per angla materialo*.

La bicikla febro komenciĝis de post la jaro 1887, kiam en Mostar alvenis la unua instruisto pri biciklado. Tiam estis fondita la societo *Mostar Radfahrer* kaj komenciĝis konkursoj en diversaj kategorioj. La plej interesa estis tiel nomata *dama konkurso* kiun premiis la damoj de Mostar. Kiam inĝeniero Miloš Komadina por 2000 m distanco bezonis 6 minutojn kaj 30 sekundojn, la damoj premiis la venkinton per arĝenta pokalo kun oraj desegnoj. Li krome ricevis arĝentan ordenon. Estis ege varme tiun aŭguston kaj multaj observantoj de la bicikla konkursado devis vespere sensoifigi per pluraj bierkruĉoj en la hotelo *Kronprinz*.

La rado fariĝis la simbolo de rapideco. Antaŭ ol la radoj alvenis, Mostar vivis tre malrapide. *Ju pli rapide oni vivas despli mallonge*. Tiu slogano validis ankaŭ en 1878 kiam Aŭstrio-Hungario okupis Mostar.

En Mostar en 1901 oni ankoraŭ ne povis forgesi la komplim-